

EL SCIENCOJ

INTERESAJ KAJ/AŬ GRAVAJ NOVAĴOJ

ŜTALO KAJ BETULO

Ankoraŭ avoj kaj praavoj de uralaj metalurgistoj trovis originalan metodon por produkti ŝtalajn foliojn, kiuj estas blankpuraj kiel la betulo mem. Kutime metalaj fandblokoj elirante varmigforon oksidiĝas, kaj ilian surfacon envolvas oksidaj-"pelto". En la momento, kiam fandbloko proksimiĝas al la ruliloj de laminatilo oni ĵetas sur la fandblokon faskon da betulaj branĉetoj. La branĉetoj momente forbrulas eligante gason sub forta premo. Okazas mikroeksplodo, kiu ŝiras la oksidajon, kaj el la ruliloj eliras pura lada ŝtalo.

La provo ŝanĝi betulon je aliaj arbo-specoj donis nenion. Nur betulo "amikas" al ŝtalo. Nun en Sovetunio estas konstruitaj novaj, pli perfektaj, laminatiloj, kie oni forigas la oksidajon per forteprema akvostrio. Sed tie oni uzas ne fandblokojn, sed ŝtal-blokojn, parte jam prilaboritajn kun negranda tavolo da oksidaĵo. Tamen kiam oni ricevas taskon produkti altkvalitajn ŝtalajn foliojn laminatistoj uzas la malnovan uralan metodon, kiu garantias la plej altan ŝtalkvaliton.

(Sciigo de TASS; elrusigis Sirotkin S., Inohodov Ju.)

PAHISTORIAJ MONUMENTOJ RESTAŬRITAJ EN SUDA ITALUJO

En la kamparo apud Bisceglie, en la suditala regiono Apulio, oni ĵus restaŭris du dolmenojn, la religiajn monumentojn de la prahistoria apulia civilizo, kiuj havas kuriozajn kontakto-punktojn kun la prahistoriaj monumentojde kelkaj centraj kaj nordeŭropaj landoj.

Aliaj tri dolmenoj estos restaŭritaj post nelonge; kune ĉi-kun la mezepokaj konstruaĵoj de la kamparo apud Bisceglie kaj kun la Grottoj "Sankta Kruco", ili konsistigos interesan turisman voj-planon. En la Grottoj "Sankta Kruco" oni retrovis, antaŭ kelkaj jaroj, la restaĵojn de homo vivinta antaŭ kelkaj milionoj da jaroj, praktike la plej malnova civitano de Apulio - kiun oni konas